

Eŭropa Bulteno

Septembro 2008, № 9 (74)



Karaj gelegantoj,
Septembron markis abunda aktiveco okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, la 26-a de septembro. El multaj landoj venis raportoj pri tiutaga agado. En la numero de la Euxropa bulteno vi povas legi ankaŭ pri regula laboro de EEU kaj aparte aktiva monato ĉe slovenaj esperantistoj. Mi deziras al vi agrablan legadon,

Vesna Obradović

PRI ESPERANTO EN EŬROPA PARLAMENTO

La 24-an de septembro 2008 en Bruselo EEU disdonis al ĉiuj membroj de la Eŭropa Parlamento kopion de la anonco pri Esperanto. La anonco estis publikigita en Le Monde la 9-an de septembro 2008 laŭ la mendo de honora membro de EEU Etsuo Miyoshi. Ĝi enhavis por la parlamentanoj interesajn informojn kiel la bildon de la forpasinta vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento, profesoro Geremek kaj informojn pri liaj klopodoj por lingve pli justa Eŭropo, samkiel bildojn kaj informojn pri la du parlamentanoj kiuj subtenas Esperanton: Małgorzata Handzlik el Pollando kaj Ljudmila Novak el Slovenio.

En la parlamentejo tiuokaze renkontiĝis la prezidanto de EEU Seán Ó Riain, lia frato, Jozef Reinvart kaj Maja Tišljar kiuj post mallonga vizito kaj interparolado kun Małgorzata Handzlik disdonis kune kun ŝia asistanto la preparitajn kopiojn de la artikolo en la poŝkestojn de ĉiuj parlamentanoj. La antaŭan tagon en la ĉefa koridoro de la parlamentejo estis malfermita ekspozicio pri profesoro Geremek kiun la EEU-anoj rigardis post farita laboro, konstatinte ke la momento por disdoni la informojn kun la ĉefa titolo enhavanta ideojn de profesoro Geremek estis tre konvena: unu tagon post la malfermiĝo de la ekspozicio kaj du tagojn antaŭ la Eŭropa tago de lingvoj.

Maja Tišljar

Le Monde, MARDI 9 SEPT

Le plurilinguisme grâce à dernière volonté de Geremek


Bronisław Geremek

Dans son dernier message avant sa mort le 13 juillet 2008, le vice-président du Parlement européen, a invité ses collègues à dénoter et notamment du rôle de l'espéranto dans toute solution.
Le 12 juin 2008, le Parlement polonais avait voté à l'unanimité une résolution mondiale d'espéranto à l'occasion de son 100^e anniversaire et à prix Nobel de la paix en 2008.

« Il faut trouver une solution au problème linguistique en Europe d'une langue nationale ne peut être la réponse. Une langue auxiliaire apprendre comme l'espéranto, serait une bonne solution, politique »
Professeur Reinhard Setten, prix Nobel de l'économie, lors d'un discours devant le Parlement européen.


Inazo Nitobe

Dans les années 1920, les membres de la Société secrétaire général adjoint, le japonais Inazo Nitobe de l'espéranto, mais la France, considérant que il mis son veto au projet, ouvrant ainsi la voie à la d

L'espéranto s'apprend dix fois plus vite que l'anglais et difficultés inutiles. Il a été conçu pour servir de la 120 ans. Il est devenu une langue vivante avec un achèvement à l'apprentissage des autres langues.
Vivemos Esperanton rapide kaj facile.
(Vivus apponentes l'esperanton rapidment et facile plurilinguisme)

En avril 2004, 43% des parlementaires européens ont voté en faveur de l'espéranto.


Maja Tišljar

Vous, Français, pouvez choisir la justice linguistique !


À 23 ans, suite à une déception sentimentale et peut-être à cause de ma jeune atteinte de polyarthrite, j'ai été très affectée; mes parents m'ont conseillé un retraite spirituelle pendant laquelle j'ai fini par retrouver le goût de la vie. C'est alors que j'ai appris l'existence de l'espéranto et me suis enthousiasmé pour le valeurs qui le sous-tendent. Ayant hérité la société familiale après avoir étudié commerce et l'anglais, j'ai commencé à silloner le monde, mais en me heurtant toujours à la barrière des langues. Ce n'est que dans la fleur de l'âge que j'

„ŜIPO DE LINGVOJ“

Kiom da lingvoj vi parolas, tiom da homoj vi valoras – tiel diras la proverbo. Gelernantoj de elementa lernejo numero 2 en Gubin jam la duan fojon aliĝis al la festo de la Tago de Eŭropaj Lingvoj. Ni registris la planon de nia agado en la paĝaro de la Konsilio de Eŭropo, kiel unua el la 22 programoj en Pollando (en la mondo estis 550 registritaj). „Ŝipo de Lingvoj“ – tiel nomiĝas nia prezentado.

Kial?

Ĉar al nia lernejo alfloris granda ŝipo kun flagoj ornamitaj per nomoj de diversaj lingvoj: Esperanto, pola, germana, hispana, ĉeĥa ... Sur la ferdeko etagiĝis koloraj vortaroj, kiujn antaŭe preparis la lernantoj. Ne mankis esperanta, eĉ ĉina kaj japana. Dum la longa lerneja paŭzo la infanoj de esperanta rondo „Verdaj Papilietoj“ pasie kantis „Dek esperantaj infanetoj...“. La kanzonon ili ellernis dum la printempa „Fringoj“ en Francio. Poste, kun aliaj gelearnantoj, ili kantis ankaŭ germane. Ĉi tiujn du lingvojn oni povas lerni en nia lernejo. Baldaŭ, pro lingvoj konoj, la mondo ne havos sekretojn por ili!



Krystyna Worobiej

LINGVOVESTIVALO EN DANIO

Okaze de la Ruropa Tago de Lingvoj Dana Esperanto-Asocio aranĝis lingvofestivalon la 21-an de septembro en kulaboro kun la Gepatralingva Asocio.

La prezidanto de DEA dum sia malferma saluto akcentis i.a. la starpunkton de UEA pri lingvaj rajtoj kaj Esperanton kiel simbolo de paco kaj demokratia kunvivado pere de egalrajta komunikado.

Honoraj gastoj estis la prezidanto de EEU Séan O'Riain kiu emfazis la gravecon de subteno al gepatraj lingvoj pere de siaj propraj spertoj, la membro de la dana parlamento Mogens Jensen kiu elokvente kaj varme subtenis plurlingvecon dum sia 20 minutojn longa parolado, kaj la ambasadoro de Indonezio kiu ankaŭ simpatie subtenas esperanton kaj kiu afable disponigis tre ĉarman dancistinon kiu amuzis nin per eleganta danco de Javo-insulo.

Sekvis prezentado de jenaj lingvoj: esperanto, araba, bahasa indonesia, franca, ĉina, irlanda, latina, japana, ivrit, kakaalist(groenlanda), hinda, germana, pola, aramea, latva, angla, eŭska, dana kaj svahila, dum en granda salono belaspektaj budoj prezentis la lingvojn pere de libroj kaj aliaj informiloj. La muzika parto konsistis el koncertoj de la Latvia muzikgrupo, Hotel Desperado kaj fine de tre populara dana grupo: Mezorianta Pacorkestro (Middle East Peace Orchestra).

Ileana Schröder

EKSPOZICION PRI ESPERANTO EN LJUBLJANA MALFERMIS LJUDMILA NOVAK



Okaze de Eŭropa Lingva Tago la 26-an de septembro 2008 en la reprezentejo de Eŭropa Parlamento en Ljubljana (Slovenio) estis malfermata ekspozicio pri Esperanto kiu konsistas el 8 afiŝoj kaj dudeko da e-libroj kaj revuoj. En la solena malfermo je la 12-a horo parolis reprezentantino de la oficejo Maja Kezunovič Krašek, sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio Zlatko Tišljar, direktorino de Informoficejo de Konsilio de Eŭropo en Slovenio Kristina Plavšak Kranjc kaj membrino de Eŭropa Parlamento Ljudmila Novak, kiu plurfoje substrekis sian subtenon al Esperanto. Zlatko Tišljar

transdonis al ŝi medalon kaj diplomon pri honora membreco en EEU pro ŝiaj meritoj.

Ĉeestis pluraj ĵurnalistoj. Unu rektan intervjuon por la tutslovenia radio Val 202 Tišljar kaj Novak havis dum 10 minutoj kaj Tišljar estis ankaŭ intervjuata por aparta elsendo pri kulturo por la tutlanda slovena televido. Partoprenis ankaŭ pluraj politikistoj kaj esperantistoj inter kiuj ankaŭ du esperantistinoj el Italio. Alparolis la ĉeestantojn en Esperanto ankaŭ sinjorino Edvige Tantin el Triesto.

Sinjorino Novak aperigis artikoleon kaj fotojn pri la aranĝo ĉe sia paĝaro:

<http://www.ljudmilanovak.org/modules.php?op=modload&name=News&file=article&sid=467&mode=thread&order=0&thold=0>

Zlatko Tišljar

BILANCO DE SLOVENA PREZIDADO AL EU POR ESPERANTO (UNUA DUONO DE 2008)

Nerealigitaj esperoj:

La ideo ke baze de la iniciato oficiale transdonita al la slovena parlamento kaj registaro far slovena parlamentanto Marko Pavliha, instigi la slovenajn instancojn proponi al la Eŭropa Komisiono fondon de nova fondaĵo kadre de kiu oni povus financi ankaŭ E-organizojn, NE REALIĜIS. Sed okazis agado en la slovena registaro kaj parlamento kiu kelkfoje traktis E-on. Unua iniciato de Pavliha en novembro 2006 kaŭzis trakton en la registaro januare 2007 kaj rezultis konkludo ke oni subtenu la peton. Maje Pavliha menciis E-on en parlamenta debato rilata al ŝirmo de la slovena lingvo kaj pri tio skribis kelkaj ĵurnaloj. Aŭguste 2007 Pavliha starigis duan iniciaton al la registaro trakti la konkludojn de la EEU-kongreso. Ĝi estis traktita en oktobro kiam la registaro sendis vastan respondon praktike malakceptante ĉiujn proponojn krom unu. Poste kaj Sean kaj mi dufoje skribis al la registaro petante realigon de la unua konkludo kiun ili

subtenis (proponi al EK novan fondaĵon) kaj ankaŭ Margareta Handzlik havis okazon renkonti en aprilo 2008 la slovenan registarprezidanton, kiam ŝi demandis lin pri tio. Li evidente nenion sciis. Ŝi poste sendis al li memorleteron pri tio refoje demandante kiam Slovenio faros tiun proponon. Ne estis respondo. Evidente Slovenio ne proponis fondi tiun novan fondaĵon. Malgraŭ niaj klopodoj la baza ideo ne realiĝis sed estis abunda traktado pri Esperanto en la slovenaj plej altaj politikaj instancoj.

Planitaj sukcesoj: Ni eldonadis dum la slovena periodo monatan informilon pri la prezidado kaj agado de Eŭropa Unio en Esperanto kaj retradukis ĝin al diversaj aliaj lingvoj (6 numeroj). Pri tio ni informis diversajn registarajn instancojn kaj partoprenis en pluraj kunsidoj de neregistaraj organizoj kaj ankaŭ en solenaj celebroy de EU (ekz. starto de la Jaro de Interkultura Dialogo, partopreno en lingvaj kunvenoj organizitaj de Eŭropa komisiiono). Pro tiaspeca agado ni en Slovenio ricevis multloke la pozicion de serioza partnero kaj ne plu estis traktataj kiel esperanto-fanatikuloj. La 26-an de septembro 2008 okazis en ejoj de reprezentejo de Eŭropa Parlamento en Ljubljana ekspozicio pri Esperanto al kiu la Reprezentejo invitis multajn gravajn politikistojn de Slovenio.

Neplanitaj sukcesoj:

Sekve de tio kaj kadre de preparo por la E-kongreso en Maribor ni sukcesis havi kontakton kun Ljudmila Novak, eŭropa parlamentanino, kiu oficiale proklamis ke ŝi iam lernis E-on kaj uzis ĝin kaj pretis subteni la movadon. Ŝi partoprenis en la E-kongreso en Maribor kaj tiam proponis organizi ekspozicion pri Esperanto en EP en Bruselo, kio realiĝis en januaro 2008. Tiu ekspozicio kaŭzis interparolon kun Bronislaw Geremek el kiu restariĝis la ideo el la komenco de la mandato de la nuna EP starigi poresperantan interparlamentan grupon, kio nuntempe fariĝis reala (ni estas en komenco de starigo de tiu grupo). Grava neantaŭviditaĵo estis ke kadre de la EEU-kongreso EU-fondaĵo por aktiva civitaneco aprobis subvencion al EEU de 25.000 eŭroj por la konferenco »Interkultura dialogo kaj komuniakdo« kaj en 2008 ankaŭ subvencion por la regula funkciado de EEU dum 2008 de 56.000 eŭroj (kondiĉe ke ni mem kunhavigas el aliaj fontoj 14.000). Tiu financado fakte pli ol bone anstataŭis la komencan ideon fondi novan fondaĵon. Per tiu maniero eŭrop-nivelaj E-organizoj havos la eblon esti financataj, se ili havas sufiĉan subtenon de siaj membroj kaj kapablas mem havigi almenaŭ 20% de la bezonata mono.

Konklude:

Mi opinias ke ni atingis pli da rezultoj ol ni efektive kuraĝis plani, ne formalajn sed praktikajn. Margareta Handzlik daŭre insistas pri tio ke oni devas unue informadi. Tiusence ni havis tre bonajn rezultojn ĉar krom la menciitaj agadoj, EEU dissendis dum la tri lastaj jaroj 5 leterojn al ĉiuj EP-anoj kaj 1 kodo-diskon. Aldoniĝis invito de Myoshi kun Sean al francaj parlamentanoj al la debatvespermanĝo kaj aperigado de anoncoj en grandaj gazetoj pagitaj de Myoshi. Ekde julio 2008 startis forumaj diskutoj en Bruselo organizataj de la interparlamentara grupo kiun ni planas nomi Geremek-grupo pro la tragedia morto de Bronislav Geremek en julio 2008. La financoj ricevitaj ebligis restarton de la oficejo de EEU en Bruselo kun unu pagata persono. Tiu fakto treege gravas por la estonto. Dank al la fakto ke nun eĉ du profesiaj esperantistoj diplomatoj laboras en Bruselo helpis atingi la gravajn rezultojn, sed kiam ili ne plu havos tiun mandaton, necesos profesiulo en Bruselo kiu daŭrigos la teknikajn agadojn kaj grupigos aliajn gravajn funkciulojn en Bruselo, kiuj povos kunpartopreni en la agado por niaj celoj.

Zlatko Tišljar

EEU EN PRESTIĜA EKONOMIA ARANĜO

Septembre (inter la 10a ĝis la 13a) okazis en pola banurbo Krynica jam 18a Ekonomia Forumo. Ĉi-jare ĝin jam 3an fojon ĉeestis ankaŭ esperantistoj – nome reprezentitaj far EEU, kiu dum la aranĝo elpaŝis kun propra podia diskuto kaj prizorgis informstandon pri Esperanto kun tutaranĝa deĵorado.



La Esperanto-ĉeeston en la forumo kunfinancis 3 organizoj – EEU, Universala Esperanto-Asocio kaj Esperantic Studies Foundation. Granda merito apartenas al prezidantino de PEA – Halina Komar, kiu danke al siaj kontaktoj sukcesis aranĝi la partoprenon de Esperanto en tiu aranĝo.

Ekonomia Forumo en Krynica estas altnivela aranĝo, kiun partoprenas multaj gravaj, decidpovaj personoj – politikistoj, ekonomiistoj, entreprenistoj, diplomatoj - ĉefe el meza Eŭropo kaj Azio. Ĝi donas unikan eblon prezenti Esperanton al tiuj personoj kaj plividebligi la temon de internacia

komunikado. Tiun ĉi unikan kaj raran eblecon - alparoli personojn kun altaj postenoj en politiko aŭ ekonomiko kapablas EEU ĉiujare eluzi. Tiel okazis ankaŭ ĉi-jare, kiam okazis ekzemple paroloj kun eksprezidento de Pollando Lech Wałęsa aŭ nuna vicĉefministro de Slovakio Dušan Čaplovič. Tiuj renkontoj estas bona bazo por postaj diskutoj en pli alta nivelo, diskutante pri temoj de lingva politiko aŭ lingvaj rajtoj.



La ĉeftemo de la podia diskuto de Eŭropa Esperanto-Unio estis ĉi-jare: *Unuiĝintaj en diverseco? Lingvolernado kaj eŭropa identeco*. La gvidanto de la diskuto estis Barbara Pietrzak, kiu reprezentis UEA-n kaj profesie enkondukis la temon. Aliaj prelegantoj kun kontribuo estis EEU-estraranoj: Zlatko Tišljár, Georgo Handzlik kaj Peter Baláž. Krom la podia diskuto okazis dum la tuta aranĝo informado pri Esperanto en la informstando, kie deĵoris 3 volontuloj

de Pola Esperanto-Junularo kun EEU-estrarano Peter Baláž. Aldone estis centoj da informiloj (flugfolioj kaj E-kalendaroj) disdonataj ankaŭ ekster la konstruaĵoj de forumo al preterpasantoj. Plurspecaj informiloj estis je dispono en la tri oficialaj lingvoj de la aranĝo: pola, angla kaj rusa. Estis surprize multaj pozitivaj reagoj kaj relative granda intereso kaj scivolemo pri Esperanto-stando.

Gravas ankaŭ la fakto, ke Esperanto (kaj EEU) estis ĉe la forumo la ununura nekomerca, neregistara organizo. Kutime ĉeestas kaj reklamas sin grandaj fabrikoj, nafto-entreprenoj ks. La estraro de EEU esperas daŭrigi ĉe tiu ĉi aranĝo ankaŭ venontjare, kaj jam nun elektas temon kaj diskutontojn por la 19a forumo.



Peter Baláž

LABORGRUPO "LINGVA POLITIKO - LA POTENCIALO DE ESPERANTO"

enkadre de la Eŭropa Verda Somera Universitato en Frankfurt/Odro (Viadrina) & Slubice (Collegium Polonicum) (2008-08-28/31)



Jen nur pri unu el pluraj ekskursoj: Pri GMO-maizo & abeloj & bio-nutraĵoj. Ni vizitis areon kie najbaras farmbieno kiu semas GMO-maizon (MON810), kiu enhavas la toksinon BT (de *Bacillus Thuringensis*). Ĝi mortigas ne nur la maizo-manĝantan insekton, sed ankaŭ papiliojn se ili manĝas la polenoj de la maizo, kiujn transportas la vento kelkajn cent metrojn, kaj kuŝante sur folioj ĝi estas manĝata de la papilio-raŭpoj, kiuj depende de la speco kaj de la kvanto da polenoj povas morti pro la toksino.

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) okazigis laborgrupon pri "Lingva Politiko - la Potencialo de Esperanto" kun 14 partoprenantoj, el kiuj 6 parolis E-on; inter ili membroj de Verda Partio en Pollando, Germanio kaj Hispanio.

D-ro Manfred Westermayer, sekretario de la Asocio de Verduloj Esperantistaj, informis pri AVE, kiu kunlaboras ekde 1984 kun la Verdaj Partioj.

D-rino Diana Siebert, sperta pri la trilanda kunlaboro de Verduloj en la Heerlen-Grupo, menciis tiajn lingvo-problemojn, kaj klarigis la malfacilaĵojn de la angla lingvo, kiuj klasifikas ĝin kiel ne-tro-taŭga kiel internacia lingvo - kompare kun la teknikaj avantaĝoj de Esperanto.

D-ro Sean O'Riain, diplomato en Bruselo kaj prezidanto de la Eŭropa Esperanto Unio, prezentis i.a. la tri gravajn lingvo-politikajn "raportojn" enkadre de la Eŭropa Parlamento:

Dell Alba (2004, uzado de Esperanto en la EP: voĉdonis favore al ĝi 43 %).

Prof-o Grin (2005, kostoj de la lingva politiko, ke fluas jare 17 miliardojn da Euro al Grand-Britio k. Irlando, kaj ke EU povus ŝpari 25 miliardojn per la uzado de Esperanto).

Maalouf (2008, proponas la lernadon de minimume tri lingvoj: patrina, ĉefa (angla ?) kaj persone elektebla, ekz-e Esperanto).

O'Riain rakontis pri la ĵus fondita "Geremek-Grupo" da Eŭroparlamentanoj por diskuti kiel rilatas plurlingvismo al Esperanto; kaj ke ĝi en la "Saltotabulo al Lingvoj" povos subteni lerni fremdajn lingvojn kaj aparte efiki la sukces-sperto de la lernantoj, ke ili ja povas lerni fremdan lingvon.

Sekvis vigla diskuto:

Tradukisto grumblis, ke li ne estos preta lerni Esperanton. Aliaj diris: Al Esperanto mankas atraktiveco, avantaĝoj, kulturo, kontakto kun la "ekstera mondo" kaj idiomaĵoj; kion la ĉeestantaj esperantistoj kontraŭis per propraj spertoj.; kaj la ĵurnaloj, ekz-e "Kontakto" kun tre aktualaj temoj. Postuli la eksperimentan uzadon de Esperanto kiel relaksa lingvo en unu el la komitatoj de la EP estis taksata kiel tro frua.

Ni interkonsentis kiel la tri ĉefajn rezultojn de la laborgrupo:

1-e. Inviti Verdanojn al la "Geremek-Grupo", por kune puŝi la rolon de Esperanto en la lingvo-lernado (propedeŭtika utilo) kaj cele al eŭropa identeco.

2-e. Postuli ke la Komitato por Kulturo kaj Edukado de la Eŭropa Parlamento mendu sciencan esploron pri la "Kontribuoj de Esperanto al la Inter-Kultura Dialogo"

3-e. Esperanto estas vivanta lingvo kun propra kulturo (..) denaskaj parolantoj, pacema historio kaj lingva evoluo.

Dimanĉe matene AVE partoprenis la "Verdan Foiiron" per informtablo - multaj interesiĝis.

Ret-paĝoj: AVE: <http://www.verduloj.org>

VSU Diskut-paĝaro: <http://www.thegreensareunited.eu/node/320>

Raporto Grin: http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf

Maalouf: http://ec.europa.eu/education/policies/lang/doc/maalouf/report_en.pdf

Lingvolanĉilo: <http://www.freeweb.hu/egalite/salto/saltode.htm>

Manfred Westermayer

JARKOLEKTO DE TAKE 2008



Komence de septembro aperis Jarkolekto de TAKE 2008, jam la kvara en la vico. La unuan jarkolekton de la teknikaj artikoloj redaktis Prof. Jan Werner (Ĉeĥio) en la jaro 2005. Sekvis lin Fabien Van Mook (Nederlando) en la jaro 2006. kaj en la pasinta jaro (2007) la jarkolekton preparis Bronislav Ĉupin (Rusio).

La ĉi-jaran kolekton redaktis Ĝorĝe Obradović (Slovenio).

Fakajn artikolojn pri konstrutekniko preparis 6 fakuloj el: Ĉeĥio, Nederlando, Francio, Rusio kaj Ĉinio. Unuaj du artikoloj temas pri konstrufiziko: sonizolo kaj ventolado de konstruobjektoj. La tria artikolo okupiĝas pri

protekto de konstruaĵoj kontraŭ influo de pluvakvo. En la sekvantaj du artikoloj temas pri la specifaj konstruaĵoj: ŝtalaj kaj pneŭmataj. Fine estas tre interesa artikolo pri la preparoj de la ĉina urbego Ŝanhajo por la Monda ekspozicio 2010.

Kore mi dankas al ĉiuj aŭtoroj por ilia fervora kunlaboro kaj mi invitas konstrufakulojn el la tuta mondo aliĝi al TAKE kaj partopreni en ĝia terminologia laboro, forumo kaj propago de esperanto inter konstruistoj.

Ĝorĝe Obradović

RAPORTO PRI PARTOPRENO EN KUNVENO DE POLIGLOTOJ

La kunvenon organizis Eŭropa Komisiono (Unuo pri komunikado kaj tradukado): temo: "Renkontiĝo kun eŭropaj poliglotoj kadre de la preparado por la Eŭropa Tago de la Lingvoj.

La renkontiĝo okazinta la 23-an de septembro 2008) tre bone evoluis, eĉ surprize bone. La organizantoj tute ne uzis tiun paĝon pri ni (el kiu iu forigis la vorton 'Esperanto'), kaj mi havis la okazon plurfoje referenci al Springboard, kaj mencii Esperanton almenaŭ 3-foje. Mi substrekis ke ne temas pri lernado de Esperanto kiel lingvo sed nur pri la baza gramatiko kaj la 467 morfemoj el la listo publikigita de Zlatko, kaj ke la 2 celoj estas levi la konscion pri lingvoj ĝenerale, kaj prepari por la studado de postaj lingvoj.

Prezentiĝis portugalo kiu tradukas el 14 lingvoj (kiu ankaŭ lernis Esperanton dum 2 jaroj, sed ne parolis pri ĝi), greko kiu studis 34 lingvojn, kaj parolas 16, svedino kiu tradukas el 12 lingvoj, kaj mi. Mi mem diris ke mi parolas 8 lingvojn, kaj povas legi kaj traduki el pliaj 6, do 14 entute. Antaŭe ni havis horon kaj duonon por prepari nin kun Leonardo Petrucci, la parolisto de Orban. Itala ĵurnalisto iom demandis al mi pri Kardinalo Mezzofanti, itala kardinalo kaj bibliotekisto de Vatikano dum la 19-a jarcento, kiu parolis 91 lingvojn (ne nur ke li parolis irlande, eĉ la 3 irlandajn dialektojn li parolis!).

Ĝenerala Direktoro Lonnroth, ĉefo de la 2,500 tradukistoj de la Komisiono, mem ĉeestis kaj poste gratulis min. Aliaj diris ke li tre kontentas pri la diskuto, kiu daŭris pli ol 1 horon, kaj konsistis el la prezentado de la 4 'poliglotoj' al la amaskomunikiloj (plejparte gazetĵurnalistoj, kvankam ĉeestis ankaŭ greka televido). Estis multege da ĵurnalistoj antaŭe, kiam membroj de la Komisiono parolis, sed ili foriris kiam la diskuto pri lingvoj ekis. Tamen, restis proksimume 20 ĵurnalistoj, kaj ili faris multajn demandojn. Principe pri niaj propraj spertoj pri lingolernado. Komence mi parolis france, angle, germane, pole kaj irlande. Ni ĉiuj 4 ricevis unue po 5 minutojn por paroli pri lingvoj, kaj poste ni 4 ricevis ŝancon respondi al ĉiu demando, kaj antaŭ la afero ili klarigis al ni ke ni estas liberaj doni niajn proprajn opiniojn. Tion mi ne trouzis. Mi estis sufiĉe zorgema, kaj ne troigis pri EO, sed kiam Lonnroth rekte demandis al ni kiu estis la plej malfacila lingvo kiun ni lernis, kaj la plej facila, mi parolis pri la pola kaj pri EO, kaj donis kelkajn detalojn pri ambaŭ. Kompreneble mi sufiĉe multe parolis pri la irlanda kaj ĝiaj lernproblemoj (eĉ pri ĝia gramatiko), kaj iom pri eŭropa identeco en harmonio kun nacia identeco! Mi ne rekte diris ke oni bezonas konsideri Esperanton por tio, sed substrekis la gravecon de la temo, la ebla kontribuo de lingva politiko al ĝi, kaj la neceso pli profunde kaj objekte studi la tutan gamon: EU/identeco/lingvoj/plurlingveco/lingvolernado.

Plurfoje mi parolis pri Springboard, kaj neniu kritikis tion. Kompreneble mi elpaŝis tre diplomate, faris kelkajn ŝercojn kiuj ridigis ĉiujn, kpt. Estis bona komenco, kaj mi faris eble gravajn novajn kontaktojn.

Fine, mi havis impreson ke la plej malsuperaj kolegoj de la Komisiono estas pli akraj kaj pli timas Esperanton (eĉ ĝian mencion), sed ke la altranguloj estas iomete pli malfermitaj, se oni ne troigas. En tiu ĉi kunveno ili volis substreki la plurlingvecon mem, kaj ke ekzistas homoj kiuj kapablas lerni plurajn lingvojn altnivele. Ili ĉiuj akceptis ke tio ne estas por la kutima civitano. Ili ne volis akran diskuton pri EO, jes aŭ ne, sed akceptis senprobleme kiam mi parolis pri ĝi en la pli preciza kaj limigita konteksto de Springboard - denove dankon al Angela Telliere pro la plej freŝaj informoj pri ĝi.

Seán O'Riain

PRI BIRDOJ

Urba komunumo de Maribor en lastaj du jaroj okupiĝas pri intensa ordigado de la urba parko. Tial multaj aferoj estis faritaj. Mi iomete kunlaboris kun ili kaj ili ĉe ni mendis informtabulojn pri birdoj en la parko. Ni proponis aldoni ankaŭ esperantajn nomojn de birdoj. Ili akceptis kaj rezulte en la tabuloj aperis post germana kaj brita flago ankaŭ flago de Esperanto kaj esperanta nomo de birdo. Tabuloj estis faritaj 10 diversaj (entute 15 specoj de birdoj) kaj ĉiu tabulo enhavas tri specojn. Ili estas metitaj en parkaj krucpunktoj, kaj aldonitaj fotoj montras kiel tio aspektas envive.



Tabuloj estis metitaj en urba parko la 10-a de septembro, kaj jam kelkaj ĵurnalistoj interesiĝis pri "nekutima" enhavo.

Ili planas similajn tabulojn meti ankaŭ apud bordo de la rivero Drava, en insulo de Maribor kaj ĉirkaŭ artefarita lago en Bresternica. Krom birdoj sur novaj tabuloj aperos ranoj, testudoj, sciuroj kaj erinacoj.

Vesna Obradović

TV SLOVENIO 1

Mardon, la 30-an de septembro vespere la ĉefa slovena televidkanalo SLO1 elsendis finan konkurelsendon Piramida, kiun spektis plurcentmil spektantoj. En la elsendo partoprenis ankaŭ Eŭropa Parmanetanino Ljudmila Novak kaj kiam oni prezentis ŝin, oni diris ke ŝi estas ankaŭ esperantistino. Tio estis bonega reklamo por Esperanto en Slovenio: unue ĉar vidis tion vere multegaj homoj kaj due, ke tion reklamis parlamentanino de EP.



Zlatko Tišljar

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de septembro 2008.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Seán O'Riain, Peter Baláž, Maja Tišljar, Krystyna Worobiej, Ileana Schröder, Manfred Westermayer, Đorđe Obradović kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu



Co-financed by the European Union within the programme "Europe for Citizens" 2007 – 2013.